

Numero: 256.  
Septembro: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## Aŭtunaj pensoj

Estas aŭtuno. Jam la noktoj kaj matenoj estas malvarmaj kaj nebulaj. La homoj malvarmas kaj ili revante pensas pri la forpasintaj someraj tagoj.

Tamen mian koron ankaŭ la aŭtuno ekkaresas kaj kantas al mi belegan melodion forgesigante la malbonon. Ĉi kanto flugigas min reen en la foraj jaroj, eĉ jardekoj. Mia animo estas plenplena de nostalgio kaj kiel mi rigardas la flaviĝantajn arbofoliojn mi ekmemoras pri miaj „forirantaj” gekaruloj.

Mi esperas, ke multaj homoj sentas tiel, kiam la aŭtuna vento trakuras la ĝardenon, kie ruĝaj pomoj, mielodolĉaj piroj atendas la rikolton. La vinberogardenoj pleniĝas de gajaj rikoltantoj.

Bela sezono estas aŭtuno. La sezono de la matureco. La homo fariĝas sana kaj kontente retrospektas pri la farita vojo.

La vesperoj kaj noktoj jam estas pli longaj. Bonega okazo legadi vespere, pliperfektigi lingvoscion, aŭ fari ion bonon por Esperanto.

Estis aŭtuno, kiam antaŭ multaj jaroj mi komencis lerni la zamenhofan lingvon, kaj mi ofertis mian vivon por ĝi. Mi neniam forgesas tiujn vesperojn. Ekstere monotone frapetis la fenestrovitron la pluvo kaj ene en la ĉambro malfermiĝis antaŭ mi mirakla mondo. Tio estis neforgesebla epoko en mia vivo. Ankaŭ nun post tiom multe da jaroj ĝoje mi rememoras pri tiuj ĉi vesperoj. De paĝo al paĝo mi proksimiĝis al la kono de interesa, sed facile ellernebla lingvo.

Se mi naskiĝus ankaŭ duafoje mi ne hezitus komenci ĉion denove. Esperanto fariĝis por mi grava komunikilo kun homoj neparolantaj la hungaran lingvon.

La semo estis plantita aŭtune kaj el ĝi elkreskis granda arbo, kies fruktoj maturiĝis. Mi deziras doni el ĝi al ĉiu homo por ke la homaro fine faligu la Babelan turon.

-Redaktanto-



## Renkontiĝo

Ŝi sidis tie sur la bordo kun, ia nepriskribebla, ekstertera rideto sur la vango. Ŝi rigardaĉis la akvon. Eĉ eble ne la akvon. Ŝia rigardo perdiĝis en la malproksimo, kie la firmamento kuniĝis kun la oceano kaj ŝi jam ne vidis alian, kiel la malklaran bluecon. Kia spirohaltiga vidindaĵo ĝi estas. Kiel kiam la virino kuniĝas en la okulo de la viro. Jes. Tio estas tiom senfina kaj tiom libera. Ŝi pensis tion.

En tiu momento ŝi sentis sin libera. Larmokulo miskondukis en la angulo de ŝia okulo ĝis fine ĝi trovis vojon por si kaj sukcesis eskapti. Ŝi lasis, ke ĝi ruliĝu tra ŝia vango, ŝi ne viŝis ĝin, eĉ ankaŭ tiam, kiam ŝi sentis ĝian salan guston ĉe la rando de sia buŝo. Nun ankoraŭ tio eĉ estis agrabla por ŝi.

Ŝi ne rememoris ekde kiam ŝi estas tie ĉi, nur pri tiu nepra devigo, kiu kondukis tien ĉi. Ŝi deziris esti sola. Malproksime de ĉiu kaj ĉio. De la devigo kaj normo. Ŝi sopiris la liberecon. Je la elekto de la libereco.

Ŝi faris longan vojon, ĝis ŝi alvenis tien ĉi. En la vera kaj miopa senco de la vorto same. Kilometroj malebenaj kurbiĝantaj vojoj, altecoj, kaj profundejoj, doloro kaj plezuro, malcerteco kaj malespero. Demandoj. Senrespondaj demandoj, mise faritaj demandoj, de malbonulo atendataj demandoj. Ŝi esperis, ke tie ĉi ŝi trovos la ĝustan demandon kaj ŝi scios ankaŭ la respondon. Verdire ŝi ne deziris multe. Ŝi serĉis nur la feliĉon, kiel ĉiu alia. Ne, ŝi ne estis malfeliĉa. Ĉi tiun ŝi neniam diris kaj ŝi neniam sentis. Per la okuloj de alia homo ŝi ne havas kaŭzon pri malkontento. Foje - foje ŝi ankaŭ hontis pro tio, kiam ŝi ĉirkaŭ rigardis en la mondo kaj vidante tion multe da teruraĵoj. Ĝustadire ŝi posedis ĉion, kaj tamen io mankis. La plena tuto.

Jes ŝi sopiris la plenan tuton. Sed defini kio ĝi estas, ŝi ne sciis. Tamen ŝi serĉis ĝin senĉese. Unue ŝi pensis, ke tion ŝi trovos nur en alia homo. En iu, kiu povos fariĝi ŝia vera kunulo. Korpe-anime. Kiu estas ŝia amato kaj ŝia kunanimulo. Al kiu ŝi ne devas senĉese klarigadi, ĉar ankaŭ sen vortoj ili komprenas unu la alian harmonie. Trans la fizika realo eĉ ankaŭ trans la transcendantan platon. Jam tiel aspektis, ke ŝi trovis la fonton de la pleneco, sed trinkante el ĝi ŝi ektimis, ke ŝi devos forlasi sian ĝisnunan vivon. Por kio ŝi laboris, kaj por kio ŝi luktis dum sia vivo. Ŝi falis en kaptilon. En ŝian propran kaptilon. Ŝi runinigis nesciante kion fari. Ŝi devis elekti, sed ŝi ne estis tiom forta ke ion ajn ŝi forjetu.

Ŝi konsciiĝis, ke ŝi iras sur misvojo, kiam ŝi serĉis la solvon en alia homo kaj ne en si, sed ĝi helpis nenion. Ŝi serĉis apogilon, sed vane sen filozofiaj doktrinoj, spertoj ĉio restas nur fikcio. Nur kredo. Kaj ne estas scianta kiu estas la ĝusta direkto, se gravas por iu ajn la individuo, kiel suverena estaĵo. Ĉu ankaŭ ĝi estas nur fikcio? Ĉu aŭ ne. Ĉu la solvo estas la tuta sinreziĝo? Pri tio ĉi rakontis la evangelio de Mateo, kion ŝi neniam komprenis, kion signifas, kiam tio estas dirata: "Feliĉaj estas la animaj malriĉuloj, ĉar ilia estas la lando de la ĉieloj."?

Nun ŝi sidis sur la bordo kaj ŝi rigardaĉis la akvon. Eble ne la akvon. Ŝia rigardo estis en senfino, aŭ eĉ jam trans tio. Pensante tion, kia sensignifa polvereto de la universo estas ŝi. Ankoraŭ tio, ke ĉi tie ŝi estas feliĉa en ĉi tiu momento. Ŝi ekstaris kaj ŝi ekiris al la oceano sur sia vizaĝo kun transtera rideto.

**-Szikora Zsó – zsoszi-**  
(Tradukis: Apáti Kovács Béla)




Zoltán Zelk:

### Dek kvar versoj

Ke via korpo ardas tra la morto,  
tra dumil noktoj da solula sorto,  
ke ami vin mi senjuste aŭdacas,  
ke kloŝon de orfeco vi frakasas,  
ke koro sangas pro la vitra falo,  
ke min perfingre montras la tombaro,  
ke por mi, olda hom' ne estas stelo,  
alia virto, nur la juna belo,  
ke frostaj noktoj gvas al aŭroroj  
de viaj glata ventro, brilaj kruroj,  
mi kvazaŭmorte dormas dispalpebre,  
ĉar via brilo super mi ne ĉesas,  
rosigas min feliĉo kiel ŝvito –  
tiel belege estas! Neelteneble!

Tradukis: Imre Szabó



## LA SAMAN TAGON EN LA SAMAJ URBO

III-a parto

Verkis: Miric Jadranka

Ĝus aŭdinte la feliĉan finon de la danĝera situacio homoj spontane ekplaŭdis. Multaj el ili incitis ke ili kolektu nutraĵojn kaj iom da diversspecaj varoj por helpi la malfeliĉulon.

-Mi deziras fariĝi fajrobrigadisto! ekkriis Rade admirege. La fajrobrigadistoj estas ĉiam herojoj en ĉiutaga vivo. Kiom da homoj ili savis ĝustatempe! Ĉu vi ne vidis kiom aero pleniĝis je fumo? Pli por si mem ol por la arĝitaj homoj, li starigis la superfluan demandon.

Ĉiuj rigardoj direktiĝis al la fajrobrigadistoj revenontaj al ilia Fajrobrigadista Domo post ĉi tiu sukcesa interveno.

-Mi aŭdis vin.``-spitmokis lin lia franjo.

-Se vi deziras fariĝi fajrobrigadisto vi devas multe manĝi por esti tiel forta kiel tiuj fajrobrigadistoj.!

-Do, ni revenu domon kaj tostu kune por via kuraĝa decido – plue lin ĉikanetis lia franjeto Sabina.

Homoj disiĝis malrapide kaj baldaŭ la strato estis malplena.

Suno malrapide leviĝis suprenirante la ruĝajn tegmentojn por varmigi la birdajn dometojn alte en branĉaro. Nuda branĉaro havas malnovajn loĝantojn ĉar novajn estas revenontaj meze de printempo .

Samtempe en la izolita parto de la urbo, pli proksima al arbaro naskiĝis nova rakonto.

ANA

Je la deka horo matene Ana forlasis la domon.Ŝia frato petis ŝin ke ŝi vizitu apotekon por aĉeti kelkajn medikamentojn kiujn li tre bezonas .Li estis vundita en pasinta milito okazinta en Serbio dum NATO - bombado, en 1999.

Li estis sana kaj bela fraŭlo sed nune li estas kripligita kaj bezons ne nur fremdan helpon sed ankaŭ regulan medikamentouzadon. Lia patro estis malsana de longa tempo. Li ne estis dungita, pro tio li estis ofte maltrankvila kaj rapide fariĝis drinkemulo.

- Kio estas tio? Ĉu ia rendevuo?``....Ĉu ne estas ama renkonto - miris la frato de Ana fortvoĉe. La viroj ekridetis. Ana ruĝiĝis. Ĉu vi ne havas pli bonan laboron ol ĉikani min? Ana demandis ilin .

- Kial vi volas scii kien mi iros? - scivolis Ana. Ŝia frato turnis okulojn kaj fajfis fingre. ``Ĝis revido``, kara. Poste ni interparolos.``

Ana forlasis la domon enpensita. Jes, ŝi estas dudekjara kaj tre ŝarĝita pro la familia situacio. Ŝi ne havas pli da libera tempo por amikadi kun siaj samaĝuloj. Ili vivas tre modeste sed pro hereda fiero ŝi ne volas paroli pri tio al aliuloj nek almoze akcepti donacojn. Ŝi estis konscia ke homoj ŝatas ŝin pro ŝia bonkoreco kaj pro ŝia preto helpi malriĉulojn. Ja, ĉu ŝi volonte ne akceptis helpi al juna paro vartante ilian bebon. Kaj hieraŭ ŝi promesis al s-ino Javorka helpi ŝin en kuirejo. Dumonata laboro estas tre bonvena, ĉar malmultaj homoj havas laboron. Estas monda ekonomia krizo kaj ĉiutaga vivo estas plena de malfacilaĵoj.

S-ino Javorka estas divorcitiĝinta, kvindek jaraĝa loĝanta kun siaj du ĝemeloj. Ŝi estas bonstata mastrumantino.

Ŝiaj du filoj estas sufiĉe aĝaj por helpi ŝin sed ĉi-foje ŝi estis mem surprizita kiam ŝia fratino lasis sian trijaran infanon ĉe ŝi. Ŝi promesis ke ŝi revenos tuj post diplomiĝo ĉe universitato en Anglujo. Do, tri monatoj tro longe! Ŝiaj vangoj ruĝiĝis pro malvarma vetero kaj pro tio, ke ŝi estus trompita.

Ne, mi estos optimista kaj ĝisatendos la junulinon novan vartistinon - balbutis ŝi al si en mentonon.

Survoje al la domo de s-ino Javorka Ana eksentis sin strange. Ĉu mi ne vidas bone? Ĉu tiu junulo hazarde iras en la saman direkton kiel mi? Ja, mi turniĝos maldekstren, kaj mi vidos ĉu ankaŭ li turniĝos - ekpensis jam maltrankvile Ana. Kaj vere ĵus kiam ŝi turniĝis la samon faris kaj la junulo.. Pro la vira ĉeesto piediranta malantaŭ ŝi Ana decidis pli rapidigi siajn paŝojn. Ŝi sentis fortan korbataĉon. Feliĉe antaŭ ŝiaj okuloj aperis la vilao de s-ino Javorka. Starante antaŭ la blanka vilao ŝi provis eksnorigi la sonorilon, sed la junulo faris tion anticipe. Ŝi estis surprizita, ĉar ŝi ne esperis ke tiu junulo estu la filo de Javorka. .

- Ha, mia kara Ana, vi jam ekkonis mian filon Trajko. Venu ĉi tien, sidiĝu ĉe la tableto ĉar mi devas starigi multajn demandojn al vi- diris laŭtvoĉe Javorka.

- Dankon, sinjorino, Javorka. Mi ne sciis, ke Trajko estas via filo - respondis Ana.

- Panjo, mi ne estas Trajko .....mi estas Rajko rigardu min, gaje diris Trajko iom ride li riverenis al Ana.

- Mi estas Rajko, mia pli aĝa frato nomiĝas Trajko. Ana salutis lin kaj turnis sin al la s-ino Javorka, kiu estis parolanta al ŝi. - Bedaŭrinde vi devos atendi iomete, ĉar nia etulo iris promeni kun sia onklo.

- Pardonu kara - diris kviete s-ino Javorka.

Ana ekrigardis la junulon, nomata Rajko. Ŝi rimarkis liajn belegajn blujajn okulojn profundajn kiel maro. Sur lia vizaĝo aperis rideto. Li estis en sporta moderna jaketo kvazaŭ makulita en trikoloroj en la supra parto de jaketo. Li estas alta, tutan kapon pli alta ol ŝi. Lia nigra hararo iom onde falis sur lian

ŝultron. Ana ekruĝiĝis kaj honte rigardis suben. Tiam audiĝis afabla voĉo de s-ino Javorka.

- Jen, bonvolu varmigi vin per taso da teo! Bonodoro allogis ŝin kaj ŝi dankeme akceptis la alvokon.

Dume la dua filo de s-ino Javorka revenis hejmen kun trijara knabino. Iliaj gajaj voĉoj eĥis tra la domo. Sur la pordo aperis junulino tenanta mane la knabon. Malantaŭ ŝi staris viro. Ana surprizite rigardis liajn grizo - blujajn okulojn.

- Mi estas Trajko, kaj vi Ana ...Mi aŭdis multon pri vi, fakte el via letero skribita al panjo, Javorka. Jen via laboro - li montris al la knabino .

Poste akompanis ilin Rajko. Ekvidante lin la vangoj de Ana denove ruĝiĝis .

-Vi ne estas Trajko sed Rajko ! kuraĝe ŝi diris al li. Vi volus min trompi, ĉu ne?- demandis lin Ana scivoleme.

Ambaŭ fratoj mire rigardis ŝin. Tiam enmiksiĝis s-ino Javorka..

- Bravo, mi gratulas vin. Ili estas ĝemeloj kaj malmultaj homoj rekonas ilin. Kiel vi sukcesis rekoni ilin ? -s-ino Javorka mire demandis ŝin.

- Ja, tio estas mia sekreto, respondis Ana, kaj ĉiu ekridetis. Tamen post ilia persista instigado ŝi klarigis .

- Kiam mi unufoje vidis vin, Trajko, mi rimarkis vian belegajn blujajn okulojn profundajn kiel maro, kaj via pli juna frato havas bluogrizajn okulojn. Kaj vi surmetis sportan jaketon kvazaŭ makulita trikoloro en la supra parto de jaketo, kaj via frato havas la similan sed sen makulojn.

Ekde tiam Trajko kaj Rajko fariĝis bonaj amikoj kun Ana kaj ofte akompanis la fraton de Ana kondukinte lin al la sportaj skiterenoj aŭ promeniĝi lin per rulseĝo tra urbo. Tiel Ana akiris amikojn kaj ŝia frato neniam plu solis.

Fino

*(Pro teknikaj malfacilaĵoj nun ekaperis la fina parto. Tial mi petas pardonon de la kara Leganto)*



# Por infanoj

## Malkuraĝa leono

Onidire la leono estas tre kuraĝa besto, tiel ĝi estas nomata la reĝo de la bestoj.

Tamen en iu tago mi aŭdis pri malkuraĝa leono, kiu forkuris ankaŭ pro eta muso. Tial la aliaj leonoj primokis ĝin.

-Rigardu, ĉi tie venas la malkuraĝa leono, kiu timas ankaŭ de eta muso!

Tio ĉi ege ĝenis ĝin. La leono kaŝis sin kaj ĝi ploris dum la tuta tago. Ĝi ne kuraĝis elveni el sia kaŝejo.

Kiel ĝi sidaĉis malantaŭ densa arbusto, neatendite ekaperis zebrido kaj ĝi gaje demandis la leonon.

-Saluton! Ĉu vi venos ludi kun mi?

La zebrido sciis ankoraŭ nenion pri la vivo. Ĝia patrino forgesis atentigi ĝin, ke zeброj devas esti singardemaj, kiam renkontas leonon, ĉar ĝi estas timiga besto. La leonoj ofte ĉaskaptas la malfeliĉajn bestojn.

La malkuraĝa leono tre ektimis de la zebrido. Ĝiaj strioj nigraj kaj blankaj estis tre interesaj kaj strangaj. Post iom da hezito ĝi elbuŝigis:

-Se vi deziras, mi povas ludi kun vi.



Tiam okazis miraklo, ĉar ĝi forgesiĝis pri la malkuraĝeco kaj gaje ĝi komencis ludadi kun la zebrido.

Ili fariĝis veraj bonaj amikoj. Ili promesis unu al la alia, ke ili renkontiĝos ankaŭ en la estonto.

Vesperigante la zebrido ekiris hejmen, ĉar ĝi promesis al siaj gepatroj, ke ĝi hejmeniĝos ĉiam antaŭ la sunsubiro.

Nokte ili ambaŭ sonĝis pri la gaja posttagmeza ludado kaj ili apenaŭ atendis la alitagan renkontiĝon.

Tiel okazis dum longaj semajnoj, ili renkontiĝis preskaŭ ĉiutage. La ludoj estis senfinaj. Se ili laciĝis dum la ludado ili sidiĝis sub arbon kaj ili kantis aŭ rakontis unu al la alia belegajn rakontojn.



Miraklaj tagoj estis tiuj. La du amikoj estis tre feliĉaj kaj bonhumoraj.

En iu tago la leono vane atendis la zebridon. Ĝi ne alvenis en la preparolita tempo. Tio ĉi ankoraŭ neniam okazis.

La leono maltrankviliĝis pro sia malgranda amiko. Ĝi atendis kaj atendis. Ĝi plurfoje iris al la vojo sur kiu la zebrido kutimis veni. La leono nerveze iradis tien – reen de la arbo ĝis la vojo. Mankis al ĝi ĝia amiko. Sola ĝi ne povas ludi. Tio estas enuiga, se ne estas kunulo.

Dume pasis la tempo. Ĝi ne sciis, kie estas sia amiko, la zebrido. Ĝi timis forlasi la grandan arbon. Tamen ĝi estas la malkuraĝa leono. Ĉi tie ĝi sentis sin en sekureco.

Io flustris al li, ke la zebrido estas en danĝero. Ĝi devos fari ion por savi sian etan amikon. Ĝi nur ne estus tiom malkuraĝa. Ĉerte ĝi ekiris kaj helpus, se estas necesa. Sed ĝi estis malkuraĝa kaj timis fari ion. La timo paralizis siajn piedojn. Aliflanke en ĝia kapo boris la ĉagreno, kia amiko ĝi estas kiu ne helpas al la zebrido.



Ĝi ne povas sidi nenionfarante sub la granda arbo. Timeme kun tremantaj piedoj ĝi ekiris por serĉi sian amikon. Vere ĝi ne sciis, en kiu direkton ekiri. Ankoraŭ neniam timis tiom, kiel nun.

Post iom da hezito ĝi ekiris laŭ sia nazo. Longe ĝi paŝis sur la vojeto kaj jam ankaŭ la soifeco torturis treege, sed ĝi paŝadis kaj paŝadis pensante pri la eta zebrido.

Ĝi pravis. Ĝia amiko estis en danĝero. Friponaj kaŝĉasistoj kaptis ĝin kaj fermis en kaĝon. Oni devas malhelpi, ke ili forportu ĝian amikon.

De iu ĝi aŭdis, ke la ĉasistoj havas pafilojn. Kion fari nun? Ili povas murdi ĝin. La leono preskaŭ ekploris. Neniam ĝi timis tiel, kiel en tiu ĉi momento.

Se ĝi ne helpos, tiam ĝia amiko estos forportita al malproksima lando kaj ĝi neniam povos ludi kun ĝi.

Neatendite ĝi ekmemoris pri sia avo, kiu rakontis al ĝi, kiel ĝi forpelis kvin kaŝĉasistojn, kiuj minacis la bestojn antaŭ multaj jaroj.

Kio okazus, se nun ankaŭ ĝi ripetus la heroecon de sia avo? Eble tio estos sukcesa kaj ĝi povos liberiĝi la zebridon.

Ĝi tre timegis, sed malgraŭ tio ĝi ekiris al la direkto de la kaŝĉasistoj. Ĉio okazis fulmrapide. Subite ĝi trovis sin antaŭ ili. Ankaŭ ĝi surpriziĝis, sed plej bone la friponuloj. Ili povis fari nenion. Ne estis tempo por uzi la pafilojn. Ili panike forkuregis kaj tiel la zebrido saviĝis. Ili feliĉe interbrakumis unu la alian kaj ekde tiu ĉi tago la leono ne estis plu malkuraĝa. Ja ĝi savis la vivon de sia amiko.

-Onklo Adalberto-



# Vinberotikoldado



# Vinberotikoldado

